

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.

# Oomoto

1  
9  
6  
7

Sept-Okt.

29-a Jaro N-ro 327-328 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo



Du fotoj de Hideo Haga  
prezentas la Straton Zamenhof  
(supre) kaj ĝian ŝildon (dek-  
stre) en Varsovio, Pollando



# PACO

“La paco portas Dian ĝojon.”

“La Dia paco superas ĉiun ajn scion.”

La Majstro

La paco estas donaco de la Spirito. Kie la Spirito ĉeestas, tie paco regas. Kiam en la konscio penetras la ideo pri Unu sola Universala Vivo, kiam la homo ĝin komprenas fundamente, la Paco komencas lin lumigi, lin heligas de interne. Iom post iom la homo eliras el la malvasta cirklo de la persona vivo, eniras en la Grandan Vivon kaj plifortigas siajn ligojn kun ĝi.

La vojo al la paco estas vojo de lernado kaj edukado. La homo devas labori longan tempon ĝis li akiros pacon.

Kristo diras al siaj disĉiploj: “Pacon mi testamentas al vi, Mian pacon Mi donas al vi.”

Estas universala lingvo en kiu parolas ĉiuj estaĵoj. Ĝi estas perceptebla senpere, de interne.

Ju pli perfekta estas unu estaĵo, des pli plene li ĝin perceptas kaj pli perfekte ĝin esprimas. La homo povas esprimi tiun lingvon per parolo, per muziko, per moviĝo, koloroj, desegnaĵoj — ĉiuj artoj estas interpreto de tiu lingvo. La Grandaj verkistoj, la intelektuloj, la homoj

de la arto kaj la vivo, sociaktivuloj ekzercas interpreti tiun universalan lingvon, tamen, kiom ajn perfektaj estas iliaj provoj, nur malgranda parto el ĝi oni povas transdoni, pli granda parto restas neesprimita. Tiu lingvo estas neelĉerpebla trezorejo de scio kaj saĝo.

La prudenta mondo, kiu gvidas la homon, longan tempon lin edukis kaj instruis scipovi legi la libron de la vivo.

Kiu komprenas tiun lingvon, interparolas kun Dio, kun la anĝeloj, kun la progresintaj fratoj de la homaro. Tiun lingvon oni devas lerni senĉese. En la skolo de la Blanka Frataro oni studas la lingvon de la Viva Prudenta Naturo. Ĉiu formo de la vivo estas “vorto” el tiu lingvo, ĉiu moviĝo — ritmo, beleco. Tio estas parolo. La sunleviĝoj, la kanto de la torentoj, la formiĝo de la nuboj, la formoj, la koloroj, la aromo de la floroj, la dolĉeco de la fruktoj, la forto de la pano, la pensoj, la sentoj, kiuj plenigas la koron, ĉiu bona impulso — tio estas parolo de la Eternulo.

Sen Dio ne povas esti paco. Sen Dio povas esti nek ekstera, nek interna paco.

La malgranda vivo devas esti en konkordo kun la Granda. Tio estas scienco. Tio estas Vojo. La homo devas labori longan tempon por krei vivkoncepton kaj karakteron. Ĝi estas ago por tuta vivo — por multaj vivoj. En tiu laboro la homo devas esti gvidata de Majstro.

En la skolo de la Blanka Frataro la disĉiplo sin preparas eniri en la Grandan Vivon.

La Frataro estas ideo de la Universala Vivo. Laborante por la Frataro, ni laboras por paco. Tie ĉi la homo trovas siajn fratojn, agantojn por paco sur la tuta tero. Tio ĉi estas renkonto kun si mem.

La ekstera cirkonstancaro ne malheligu la internan lumon. Ĉiu estaĵo, eĉ la malplej granda, ekzistas por ke Dio sin manifestu per ĝi. Do, ĝi povas esti ankaŭ vojo al Dio, vojo al la Granda Vivo. Tio difinu niajn rilatojn al ĉiuj.

La homaro sur la tero ne estas izolita de la aliaj homaroj en la Kosmo. Hodiaŭ la astronomoj asertas, ke en la universo ekzistas sennombre multe da mondoj similaj al la nia, kiuj posedas samajn kondiĉojn de vivo, do, vivon similan al la nia. Kelkaj el tiuj homaroj estas pli progresintaj, aliaj estas en malpli alta

stadio. Kristo esprimas tion figure: “En la domo de Mia Patro estas multaj loĝejoj”.

Sub “Patro”, Li komprenas la Grandan Universalan Vivon.

La ligo inter la homaroj en la Universo efektiviĝas ĉiam. La prudenta Naturo kreis vojojn por tio. Sur la tero venadis kaj venas progresintaj estaĵoj de aliaj homaroj. Kio fakte estas la grandaj Majstroj, filozofoj, sciencistoj, poetoj, muzikistoj, sociagantoj, verkistoj, pentristoj, kiuj puŝas la homaron antaŭen? Ili estas la Grandaj Fratoj de la homaro. Ili regas la leĝojn kaj la fortojn de la materio kaj laborante en konkordo kun la Prudenta Naturo, ili povas krei al si korpon kie kaj kiam ili volas. Tiuj ĉi estas normalaj vojoj de la naturo, laŭ kiuj la homaroj en la Universo komuniĝas. La vojaĝoj per mekanismoj estas limigitaj. Ili estas ekzercoj. Ili plivastigas la konscion, plifortigas la volon, plialtigas la spiriton. Ankaŭ ili estas inspirataj de la progresintaj fratoj de la homaro.

La homa cerbo estas mirinde organizita. Kiaj fortoj funkcias en ĝi, kiaj kapabloj kaj funkcioj estas en ĝi, kio fariĝas en tiu magia fokuso? Tiel, kiel ĝi estas organizita en tiu rondformo, en ĝi estas projektataj ĉiuj mondoj de la Universo. Ĝi estas ilo, kiu akceptas kaj transdonas

la universalan lingvon. Ĝin ĝi interpretas.

La cerbo estas potenca dinamiko kunligita kun la astroj. Ĝi perceptas signalojn el malplej proksimaj mondoj kaj posedas la kapablon plifortigi ilin miliardoble kaj prikulturante ilin naskiĝas ideoj, pensoj, sentoj, bildoj, figuroj. La malproksima mondo ekparolas. Tiel la homo interparolas kun siaj fratoj en la Universo.

La granda unika scio estas transdonata tra la spaco.

La homo partoprenas en la kosma vivo.

La homoj en la Universo komuniĝas inter si. Ili havas komunan vivon.

Hodiaŭ oni parolas pri unuiĝo de la kredantoj. Sed unuiĝo de la kredantoj ekzistas. Ĝi efektiviĝas ne per decidoj de eklezioj kaj kongresoj, ne per ordonoj. Ĝi venas kiel rezulto de kompreno, de vivkoncepto, de profunda travivo de la unueco de la vivo.

Venis jam tempo, ke la homo vivu en la Granda Vivo, ĝin sentu kiel propran vivon, lernu kaj respektu ĝiajn leĝojn. En tio staras la granda scienco.

La prudenta naturo aranĝis tiel, ke la homo vivu la duonon de sia vivo en sia personeco kaj la alian duonon en la granda vivo. Oni ĝin

nomas dormado, sed ĝi estas vivado en la Granda Vivo. En ĝi la homo ripozas, revigliĝas. El ĝi li ĉerpas forton. Multajn aferojn alportas la homo, revenante el sia “Patra domo”. La malgranda vivo estas donita al la homo, por ke li provu la Grandan. La profeto diras: “Jen ne plu estas tempo”. Kiu estas tiu stato? Ne estas tempo, ne estas ankaŭ spaco. La tempo kaj la spaco estas kunligitaj kun la individua konscio. Estas io trans la tempo kaj la spaco. “Ne estas tempo” — ni komprenas, ke la malgranda vivo revenas en la Grandan. Malaperas en ĝi, sed ne perdiĝas. Kiam la homo naskiĝas, aperas la “tempo kaj la spaco”. Ili estas projekciaĵo de la realeco sur la ekrano de la konscio. Kiam malaperas la iluzio de la personeco, la baro, kiu apartigas la homon el la granda vivo, oni travivas la vivon de la Tuto.

Multaj abeloj laboras por guteto da mielo — Dio laboras per ili.

Same en la floroj, kiuj produktas nektaron — Dio manifestiĝas per ili.

La homoj estas blindaj, ĉar ili ne vidas Dion.

Vidi Dion, tio estas ĝusta vidado, ĝi estas vidado ne nur per okuloj, sed per la koro, per la intelekto kaj per la animo.

Antaŭ multaj jaroj la Majstro prelegis je temo: “Ekfloro de la

homa animo". La homa animo ekfloras por la Granda Universala Vivo, ĝin perceptas kaj manifestas. Ĝuste tio okazas hodiaŭ. Potenca luma ondo obsedas la homaron de interne. La homaro estos savita de niaj Grandaj Fratoj. Ĉu hodiaŭ vi ne vidas, ke la malbono estas servanto al la bono?

Se la kredantoj ne volas plenumi la laboron, kiun Dio komisiis al ili, ĝin plenumos la nekredantoj.

Dio laboras en la mondo. Sub Lia aŭtoritato estas la bono kaj la malbono. Ili estas fortoj en la vivo. Li uzas ilin kie kaj kiam estas necese.

#### KONSILOJ AL LA DISĈIPLO:

Akceptu la bonon en la vivo — tion, kio estas bona kaj prudenta. Ĝin akceptu kaj sekvu, de kie ajn ĝi venas. Ĝia fonto estas unu. Ĉiu homo, ĉiu estaĵo posedas fajron de ĝi.

Tiu Dia fajrero pravigas ĉies ekziston.

La renkontiĝo de estaĵo estas beno. Atentu, kion Dio volas diri al vi per ĝi.

En la mondo Dio parolas. Estu obeema al Lia parolo.

Kion signifas hodiaŭ vidi la Dian planon? Vidi, kiel Li laboras, kompreni kiel Li uzas la bonon kaj la malbonon? Ĝi estas interpaciĝo de la du fortoj. Super ili staras la

Dia vivo. Ĝin serĉu en ĉio. Vidinte Dion en estaĵo, vi lernas ion novan, la specifikan aferon, kiun ĝi portas.

En la mondo da bonaj aferoj estas tiom multe, ke pri malbonaj aferoj oni povas neokupiĝi.

“La Frataro estas Granda Vivo, pli granda ol estas la Dia Regno, super la Dia Regno estas la Dia Amo. Tiel diras nia amata Majstro. Tiu estas la Vojo. Tiuj ĉi estas paŝoj de la animo.

Grandaj perspektivoj staras antaŭ la disĉiplo de la Dia skolo.

La suno longan tempon devas brili sur la frukto ĝis ĝi maturiĝos kaj kiajn bonojn ĝi enportas en ĝin! La homa konscio same maturiĝas kiel la fruktoj.

1967-a jaro pretigas la alvenon de la Paco.

Por la disĉiploj de la Dia Skolo ĝi estas jaro de paco kaj kreado.

En letero al disĉiplo la Majstro skribas:

“Ni renovigos la Dian Doman. Ni prenos la Dian Regnon per Amo. Ni ĝin tenos per Amo kaj subtenos per Spirito. Jen estas la interna senco de la nova instruo, kiun la Dia Spirito portas en la mondon. La nunaj tempoj estas nur antaŭparolo, preparo de kondiĉoj por alveno de la Filoj de Dio”.

Ni gratulas la disĉiplojn de la Dia Skolo per la nova jaro. Kie ajn ili

# La 54-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj

8 – 9 julio, 1967, Kioto

Dum la du kongresaj tagoj pluvegis kaj pluvegis senĉese, pro superjapanujiĝo de tajfuno. Eĉ haltis kelkloke funkciado de veturiloj kaj trajnoj pro terura pluvego. Malgraŭ tio, kolektiĝis en Kioto 430 fervoraj esperantistoj por festi la 80-jaran datrevenon de la publikigo de Esperanto kaj la 50-jaran datrevenon de morto de d-ro Zamenhof. Dank' al tia, iusence pilgrima spirito de la partoprenintoj, kiuj envenis en la kongresurbon trabatinte al si ĉian malfacilaĵon, nur pro tio, eblis brile sukcesi la 54-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.

La Kongreso oficiale malfermiĝis je 13:00 en la 8-a de julio, per malferma deklaro de la Kongresa Prezidanto, s-ro Masajuki Kuroda, kies poeta parolo kun akcentaj vortoj pri la signifo de la nunjara kongreso, jam aŭguris la glatan iradon de ĉiuj

kongresaj programeroj seriozaj kaj distraj.

Seriozaj eroj, fakte, superis al distraj. La unua serioza: malferma soleno, en kiu salutis la kongresaron kiel kutime fraŭlinaj reprezentantoj de 8 distriktaj ligoj kaj ĵus japaniĝinta (pro edziĝo al japanino) germano; okazis diversaj honorigoj al la premiitaj aktivuloj kaj talentuloj en la kampoj de movado kaj literaturo; kaj la soleno finiĝis per festparolado de juna aktivulo en Kansai-distrikto, kiu asertis pri porpaca enpuŝigo de esperanto-movado.

Sekvis tuj kongresa laborkunsido, kiu pritraktis du temojn: unua pri venontjara kongresloko — akceptiĝis la invito al Sapporo, Hokkajdo — kaj alia pri okazigo de Pacifika Kongreso de Esperantistoj (pri la lasta ni prezentos detalan raporton en la

---

troviĝas tra la mondo, ili estas portantoj de Paco.

Ni petas, akceptu niajn fratajn salutojn — Disĉiploj de Universala Blanka Frataro

## Utafesta Poemaro


ilustrita

Bind. 105 p.

\$ 2 aŭ 7,20 ned. gld.

Mendu ĉe: U.E.A.





venonta numero).

Instrua kaj konstrua por la estonta laborado de agemaj esperantistoj estis la prelego de s-ro Sakjo Komacu, fama verkisto, en la Kongresa Universitato. Li parolis pri “futura lingvo” surbaze de lia scienc-fikcia esplorado, kaj submetis kelkajn utiligendajn proponojn al ni por plia disvastigo de la internacilingva movado.

Ankoraŭ sinsekvis seriozaj temoj, nome, publikigo de premiitaj eseoj pri la japana esperanto-movado cele al la 100-a jaro de Esperanto; kaj eĉ vespere ne mankis tiaj en diversaj fakaj kunvenoj.

Distraj eroj ne mankis kompreneble: filmprezentado de “Nov-Zelando” kaj “Fiat aŭtomobiloj”; kantado de esperantaj popolkantoj. Oni povus bone prezenti al si, kiel ampleksa estis la programaro plenumita akurate dum nuraj 8 horoj en la unua tago.

Tiu densa programigo kaj akurata irado de ĉiuj planitaj eroj daŭris ankaŭ en la dua tago. De la 9-a horo matene ĝis la 5-a horo posttagmeze, en la Eduka kaj Kultura Centro de Kioto, enpakiĝis ĉiuj kongresanoj, parte pro pluvego ekstera kaj ĉefe pro interesaj programeroj.

En la daŭro de 8 horoj de la dua tago, okazis entute 13 aranĝoj, 3 el kiuj ankoraŭ dividiĝis en pluraj fakaj kunvenoj kaj prezentaĵoj. Tiel multaj aranĝoj okazis, iuj en granda halo por ĉiuj kongresanoj samtempe, aliaj en malpli grandaj salonoj por pli intimaj rondoj. Ŝajnas, ke ne interesus niajn legantojn, se ni ĉi tie titoligus ĉiujn erojn; ni ne faros tion, sed mencios nur pri la fakto, ke la organizantoj profunde konsideris, ke la Kongreso estu plaĉa egale al veteranoj kaj novuloj, por ke ĉiu kongresano povu plene ĝui la kongresajn tagojn, elektante al si la plej plaĉan el la programeroj, aranĝitaj samhore sed apartaloke; ekzemple okazis paralele kvar aranĝoj en la mateno de la dua tago: 1) fakaj kunvenoj, 2) diskutado s.t. “movado laŭ urba karaktero”, 3) interesaĵoj por novuloj (prezentado de ludoj, korespondado, legaĵoj per-esperantaj kaj faktoj pri esperantujo tutmonda), kaj 4) ekzameno pri kapablo de esperanto. 430 kongresanoj do dividiĝis en 4 lokoj (ekzakte en 8 salonoj) laŭ sia intereso kaj bontrovo, tiel ke neniu el la kongresanoj restis for de la kongresejo.

Necesas tia konsidero rilate al la planigo de programeroj plaĉaj aŭ konvenaj al la kongresanoj konsistantaj el diversaj etapoj de la esperantisteco. Tio aliflanke montras,

ke en Japanujo konstante kreskas la nombro de la novuloj — kaj ankaŭ multaj malnovuloj restas ĉiamuloj de la kongresoj.

Okazis nenia rezolucio. Sufiĉis por ĉiu partopreninto senti en si la pli fortan ligitecon kun la internacia lingvo kaj volon por laborado.

Sereniĝis la sekvinta tago, en kiu pli ol cent postkongresanoj ĝuis la viziton al diversaj belegaj lokoj en kaj ĉirkaŭ Kioto ne vizitataj de kutimaj turistoj.

(*Joŝimi Umeda*)

Ueyama masao :

## Ne grimacu !

Naŭ originalaj rakontoj humuraj

17.5×11cm. 84p.

Prezo : 2,- gld.

*“Tro malofte oni sukcesas ekridi, en la nuna epoko, pri la vira sekvanteco. Tiun donacon Ueyama alportas : ŝatu ĝin ! En tiu ĉi libro eĉ la glosaro ridigas.”*

W. Auld

Eld. l' omnibuso, Kioto

Mendebla ĉe UEA/Oomoto



# Japanaj terminoj en Esperanto- English Dictionary\*)

“La reciproka nesciado de Eŭropo kaj Japanujo estas ankoraŭ granda. En unu bildolibro por anglaj infanoj, ‘Elektrolokomotivoj kaj aviadiloj’, oni prezentas ilustrite la fierajn lokomotivojn de diversaj landoj, eĉ menciante pri unu, ke ĝi havas la mirindan rapidecon de 180 kilometroj en horo, sed inter ili nenie troviĝas [japana] ‘Hikari’, kiu kuras pli ol 200 kilometrojn hore. Sciu ke tiu libro estas ĉi-jara eldono”. — Tiel skribas en la japanlingva *Asahi* (vespera eld. 19.10. ’67) Prof. Takeo Kuŭabara de Kioto-Universitato, kiu antaŭ nelonge revenis hejmen, fininte sian 4-an vojaĝon tra Eŭropo por speciala esplorado. Samloke li citas ankoraŭ la pasintjaran ekspozicion de Strasbourg, Francujo, kie li vizitis i.a. la sanitar-domon kun afiŝita slogano “For la malsaton!” : li staras antaŭ monda mapo kun la landoj farbitaj diverskoloro laŭ la kvanto de l’ kaloria enpreno ; li kun miro trovas Japanujon samkolorigita kiel Hindujo, t.e. “malsatanta regiono” ; li aŭdacis atentigi junan deĵoranton pri la eraro, sed ĉi tiu ne volis esti konvinkita pri tio kaj elturnis sin for.

Tion ĉi mi citas — ĉar ankaŭ mi mem ekhavis pli-malpli similan impreson, kiam mi elpinĉis japanajn terminojn el Esperanto-English Dictionary de S-ro Butler kaj esploris ilin. Jen estas la vortoj kaj esprimoj, kiujn mi povis trovi:

bonzo	rikiŝo
cugo	sakeo
gejŝo	sojo
harakir-o/-i	ŝinto-ismo/-isto
jeno	tankao

---

\*) *ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY* (vortaro esperanto-angla), de Montagu C. Butler. Eld. Brita Esperanto-Asocio, Londono, 1967. 450 p. 18 × 12 cm., bindita.

ĵinrikŝo	utao
ĵudo	—
kriptomerio	citruso japana
kimono	nigra japana lako

Mi ne volas ŝovi la nazon en anglan vazon por diri, kio el la japanaj ingrediencoj mankas kaj kio superfluas, aŭ plendi pro ilia magra enteno. Kio interesis min en la kadro de tiuj terminoj kaj esprimoj, estas nur la maniero, laŭ kiu la kompilinto difinis aŭ formis ilin. Mi konfesas, ke ĝi donis al mi la impreson, kvazaŭ por li ekzistis ĉemane neniu konsiderinda leksikona kontribuo de japanaj esperantistoj por konsultado.

Se *kriptomerio* estas “japana cedro (*Cryptomeria japonica*)”, tiel same ankaŭ citruso : “japana citruso (*Fortunella japonica*)” devus esti *fortunelo*, termino kaj trovebla en NV<sup>1)</sup> kaj glosita en EJ<sup>2)</sup>.

Se *gejŝo* estas “japana dancistino”, tiel same ankaŭ lako : “nigra japana lako” devus esti *uruŝio*, termino kaj enkondukita en NV kaj glosita en EJ (*uruŝio*, *uruŝii*, *uruŝiaĵo*, ktp).

La difino pri *kimono* : japana virina robo aŭ simila tualetrobo, ne estas ĝusta ; ĝi efektive estas robo kaj de viroj kaj de virinoj en ĉiu aĝo. Vd EJ. Laŭ OED<sup>3)</sup> : longa japana robo kun manikoj.

La formo *jeno* (japana *mōnunuo*) estas de anglisma Yen (¥), kiel Yedo, la malnova nomo de Tokio ; sed nuntempe la fonetika *eno* estas plejofte uzata de japanaj esperantistoj, same kiel *Edo* anstataŭ anglisma (arkaisma) Yedo, kiu ĉi ne plu estas uzata eĉ en anglalingvaj verkoj. Prefero por *eno* estas montrita kaj en EJ kaj en NV.

*Sojo* estas ne planto sed saŭco produktata el *sojfaboj*, kiel *vino* estas ne planto sed trinkaĵo el *vinberoj* (Vd EJ). Laŭ OED : “Soy, Soya” estas unuasence : “saŭco preparata ĉefe en Japanujo, Ĉinujo kaj Hindujo, el la faboj de *Soja hispida* (*Delichos soja*), kaj manĝata kun fiŝo, ktp”. Kelkaj sekvas la konvencion de anglismo-francismo por formi kunmetaĵojn de *soj* en la dua (neebla kaj malĝusta) senco “sojfabo”, ekz-e : *sojplanto*, kiu korekte devas esti : *sojfaba planto* aŭ *sojfabujo* (samforma kiel *vinberujo*). Kiel ajn estu la angla, franca aŭ alia uzmaniero de termino japana, se ĝi

1) *NOVA VORTARO ESPERANTO-JAPANA*, de Y. Nukina kaj M. Miyamoto, kontrolita de N. Kawasaki (1963).

2) *ENCIKLOPEDIETO JAPANA*, de T. Nakamura (1964).

3) *THE OXFORD ENGLISH DICTIONARY* (1933).

estas evidenta eraro, ni rajtigas nin reĝustigi ĝin en esperanto, la lingvo universala, kiu estas “logika” kaj en kiun oni ne bezonas transplanti fremdan misuzon. Tiel la ĝustaj formoj fariĝas : *Sojo* しょうゆ, *sojfabo* 大豆, *sojfaba oleo* 大豆油, *sojfaba rekremento* 大豆粕, *sojfaba lakto* 豆乳, *sojfaba pulvoro (faruno)* きな粉, ktp. Cetere, mi rimarkigas ke *Glicine soja* (tiel donita) estas la specio nomata japane “curumame”, el kiu oni neniam produktis sojon (aŭ saŭcon). La sojfaba planto estas *Glicine Max* (*Glicine hispida*). Vd “Sojo — Sojfabo” en *Oomoto*, n-ro nov.-dec., 1962.

Pri japanaj apartaĵoj, kiujn S-ro Butler elektis kaj enmetis en sian vortaron mi iom bedaŭras ke li — verŝajne — ne konsultis japanajn esperantistojn, kiel li ja faris pri la diferenco inter *tankao* kaj *utao*, kies difino, sekve, estas ĝusta kaj eĉ ellaborita. (Sed kial mankas *hajko* — almenaŭ?)

Sed finfine, mia bedaŭro temas pri nur kelkaj gutoj elkuleritaj el la granda maro : *Esperanto-English Dictionary*, kiu donos grandan utilon al ĉiuj uzantoj de l’ angla lingvo kaj esperanto !

T. Nakamura

**Okakura :**

Eldonis KOSMO

## La Libro de Teo

en trad. de T. Nakamura

Bind. 142 p. \$ 2.50 aŭ 9 ned. gld.

“... ĉio aranĝita kun plej alta konscio de estetikismo, kio faras la libron plej perfekta artverko en la vera senco de tiu ĉi vorto. Kaj oni ne eraras, se oni diras, ke ĝi estas esence kaj super ĉio poezia verko !” — *Benedicto Silva*

—Mendu ĉe : Universala Esperanto-Asocio—

## Enciklopedieto Japanana

kun 400 terminoj

Bind. 217 p. \$ 5 aŭ 18 ned. gld.

“... por la libro-amantoj la Enciklopedio fariĝos ŝatata apogilo dum la vojaĝo tra japana literaturo”. — *Victor Sadler*

# Aliĝu al la Secubun-festo de Oomoto per alsendo de hitogatoj

Karaj gefratoj !


Same kiel en la lasta jaro ni invitas vin partopreni per hitogatoj la Secubun-feston de Oomoto, kiu okazos tra la nokto inter la 4-a kaj 5-a de februaro 1968 en la Mirokuden-preĝejo, Ajabe.

La vorto *Secubuno* signifas la “ŝanĝiĝon de sezono” : ĝi markas la finon de la vintro kaj komenciĝon de la printempo (5 feb.) : ĝi estas la antaŭ-vespero de Riŝuno aŭ la tago de ekprintempigo, kiam la ekliptika longitudo aŭ la angulo de la suna orbito rilate al la ekvatoro atingas 315 gradojn. La japanoj celebras la Secubunon tra la lando ĉe ĉiuj tradiciamaj familioj kaj jaŝiroj — ŝintoaj sanktejoj, kun la folklorkreda rito de ekzorco, kaj tiel ili eniras la novan sezonon aŭ “novan jaron”.

La *Secubun-festo de Oomoto* havas, krom tio, aparte gravan signifon, ĉar ĝuste je la tago de Riŝuno en 1892, la Prapatra Dio manifestis sin per Nao Deguĉi, la fondintino de Oomoto, por anonci, ke “revenis la tempo por Dia Regado” kaj ke, post reformo de la mondo, la homaro eniros Novan Epokon. Do, la Secubuno estas unu el la plej gravaj jareventoj de Oomoto por purigado de ĉiuj niaj pekoj.

La Secubuna rito de Oomoto estas plenumata en du partoj : unu estas Purigado al la Kosmo kaj ĝi okazos de 19 : 00 ĝis 20 : 30 de la 4-a, kaj la alia estas Purigado de la individuaj personoj, kiu daŭros pli ol sep horojn ĝis la aŭroro de la 5-a. La Purigado de la individuaj personoj estas plenumata per hitogatoj.

*Hitogato* laŭvorte estas “homfiguro” farita el japanpatera slipo en kimona formo. Ĉiu partoprenanto surskribas ĝin per siaj nomo, aĝo kaj adreso. La hitogatoj tiel surskribitaj de *milionoj da homoj* el ĉiuj partoj de la lando kolektiĝas en amasoj ĉe la Oomoto-centro. Oni metas ilin sur la altaron de la Mirokuden-preĝejo, Ajabe. Tie okazas la soleno kaj preĝo por peko-purigado al ĉiuj homoj aliĝintaj per hitogatoj. En la daŭro de la tronokta recitado de la preĝvortoj de miloj de oomotanoj, la amasoj de hitogatoj disiras de la altaro al la ducent geservantoj, kiuj deklamas la personajn nomojn unuope de la hitogatoj kaj enmetas ilin unu post unu en



La diservantoj ĵetas hitogatojn en la riveron Ŭaĉi



Ekzemplo de hitogato sursk

argilajn potojn. Cent servantinoj, nomataj “seoricuhime”, procesie forportas la potojn al la rivero Ŭaĉi, kie diservantoj de sur la ponto ĵetas la hitogatojn en la riveron. La hitogatoj forportas ĉiujn niajn pekojn.

Al kelkaj tio ŝajnus simbolisma rito de peko-purigado kaj al multaj aliaj — nur superstiĉo. Sed por tiuj, kiuj scias la rolon de konkreta *formo* kiel la esprimo de la spirito, ĝi estas grave realisma.

Kiuj konsentas kun tiu nia kredo kaj kiuj interesiĝas en tiu ĉi rito, volu surskribi kun via preĝo la enmetitajn hitogatojn per la nomoj, aĝoj, (ne-nepre) kaj adresoj (urbo/lando) de vi, viaj familianoj kaj amikoj. Se la hitogataj folioj ne sufiĉas, volu multoblige ilin el via papero, kaj sendu ilin ĉiujn tiel ke ili atingos nin ĝis la 31-a de januaro 1968. Ni atendas la alsendon de viaj hitogatoj en kiom eble plej granda nombro. Spirite — nepre partoprenu la solenon kaj preĝon je la ĉi-supre menciitaj horoj! La purigado de ĉiuj niaj pekoj estas la nepra kondiĉo por la Mondpaco.

Sincere via,

**La Administracio de Oomoto**  
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

## BAUDOIN DE COURTENAY

— Vortoj pri Malmulte-konato Esperanta —

Li estis Polo deveninta de Franca familio (Jan Micislaw), universitata profesoro; naskiĝis 1845 apud Varsovio; mortis tie 1929 (laŭ Esperanta Enciklopedio).

Eminenta lingvisto, li kunlaboris kun E-aj kaj nacilingvaj fakgazetoj (ekz. “Vestnik Znaja”, Rusa), vicprezidanto de la Delegitaro de 1907, kaj defendis E-on kontraŭ aliaj projektoj.

Fidela kaj multescia samideano, li okupis honoran lokon en la apologia kampo, lerte prezentante siajn tezojn oratore kaj verke. Pri la pura literaturo li ne sin okupis, ĉar li sin limigis al la lingvistika flanko.

En “La Leteroj de L. L. Zamenhof” li ricevis ses menciojn en la dua volumo; neniun en la unua. En siaj cetero brilaj Prologo kaj Epilogo al tiu majstra kompilo, Waringhien ne pensis bona, fari skizeton pri tiu modesta sed potenca bastiono de la movado. Drezen en sia detala “Historio de la Mondolingvo” uzis lian nomon nur unu fojon. B. Kotzin en “Historio kaj Teorio de Ido” mallonge aludis al lia Delegacia rolo (1907), kaj Couturat kaj Leau — “Compte

Rendu des Travaux du Comité” (1907) — donis sektion pri prelego lia antaŭ la Delegacia Komitato:

“... li legis sian sciencon kaj fundescian pritrakton pri broŝuro de prof-oj Brugmann kaj Leskien (Zur Kritik der Kunstlichen Sprachen, t. e. kritiko pri la artlingvoj). En ĝi li rebatis kontraŭ-Esperantajn asertojn de Leskien, ekz-e, ke la finaĵoj -as, -is, -os facile fandiĝas sone ĉe la aŭdado.

De Courtenay respondis, ke la I. L. devas ĉiam esti zorge prononcata, por ke ĝi estu klare komprenebla, kaj ke ĝiaj uzantoj ordinare ĝustetion faras, pro propra intereso. En iuj lingvoj, ekz-e la Angla, Germana, Rusa kaj Slovena, la forto de la akcento produktas son-nebuliĝon kaj konfuzon ĉe vokaloj neakcentataj; tamen ĉe I. L. oni penas kiel eble plej minimumigi tion.”

### \* **Japanaj Malnovaj Rakontoj**

B-6 127 p. ¥ 340

Ankaŭ koloraj bildoj  
kontribuas



Lia ĉefa konsilo prilingva estis, ke la I. L. nepre havu fonetikan ortografion; li opiniis, ke indiferenta estas la konvencia asociado de ia sono kun tiu aŭ alia litero, dum la internacieco de la grafismo estas fundamenta principo de la I. L.

En Oktobro 1907, du monatojn post la Delegacia afero, li vizitis Zamenhof-on, kiu “antaŭe tute ne konis lin” (p. 57, Leteroj de Z. vol. II). En Decembro 1907 Zamenhof menciis, ke De Courtenay aprobis “mian manieron de skribado per ‘h’, kiun li trovis perfekte bona”. (Temas pri uzo de ‘h’ por eviti cirkumfleksajn literojn). Sammonate De Courtenay neis la rajton aŭ aŭtoritatecon de la Delegacia Komitato, “kiu sin elektis, miksi sin en la internajn aferojn de Esp-o”.

E-istoj hodiaŭ povas ricevi bonan lumon pri la karaktero kaj kapablo de Baudouin de Courtenay, sin turnante al “Historio de E-o” (Privat), vol. 2, p.63. Tie estas tripaĝa letero lia, verkita post lia protesta eksigo el la Delegacia Komisiono. Ĝi aperis en “Pola E-isto”, Junio 1908.

En tiu numero Grabowski nomas lin “ne-Esperantisto, homo tute senpartieca...” kaj Couturat en letero al B. de C. en tiu sama jaro skribis: “Vi, kiu ne estas Esperantisto...”. Lia funda scio pri Esperanto kaj Ido

ne faris lin Esperantisto kaj Idisto, ĉar li ne sin konfesis *partiano* de unu aŭ la alia lingvo. En tiu senco oni devas kompreni la suprajn dirojn.

Komparu la bazan difinon en la Deklaracio Bulonja: “Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto”. Lego de la bibliografia noto en la Esperanta Enciklopedio lasas al mi impreson, ke oni rajtas nomi lin Esperantisto pro lia signifa servado al la movado.

Kroma strangaĵo: En “Helvetia”, Maj-Jun. 1932, Ric. Berger enigme informas, ke “Noi retrova Baudouin de Courtenay sur li covriment de Cosmoglotta quam ‘protector’ de Occidental !!! (la krisignoj estas liaj). Trad. : Ni retrovas B. de C. sur la kovrilo de C. kiel patronon de O. Tio tri jarojn post la morto de la profesoro!

---

Originaloj  
de japanaj  
esperantistoj

*japana  
kvodlibeto*

127 p.  
¥ 480

25  
stafeto



## Nekredebla renkontiĝo en Japanujo

Dumonata prelega rondvojaĝo en tiu belega lando donis al mi longan vicon da neforgeseblaj memoroj. Unu el la plej surprize emociaj travivaĵoj okazis en Nara, kiu antaŭ pli ol mil jaroj estis imperiestra sidejo kaj centro de la budhisma kulturo.

Kune kun aliaj partoprenantoj de la postkongreso mi vizitis tiun historian lokon en rave sunbrila tago. De la aŭtobusoj ni promenis tra imponaj aleoj por viziti la praaĵn templojn. En si mem tiaj spiritaĵoj donas profundan kaj emocian impreson al sentema spektanto. Koncentriĝo de la religia kaj spirita vivado de milionoj da homoj dum pli ol mil jaroj nepre kreas intensan spiritan atmosferon. Ĝenerale okcidentano certe kredas, ke lian impreson kreas la pitoreska fremdaspekto kaj la impona grandeco de la konstruaĵoj. Mia oninio estas, ke troviĝas ankaŭ konkreta koncentraĵo de spiritaĵoj

fortoj, kaj sekve por mi la vizito estis aparta travivaĵo.

Survoje reen al la aŭtobusoj homoj alkuris demandante, ĉu mi estas el Kopenhago. Surprizita mi respondis, ke jes, kaj kun fervoro kaj ĝojo ili kondukis min al eta grupo, kiu vigle parolis angle kun eta japana virino, cetere unu el la malmultaj, kiujn mi renkontis, kiuj vere estas kapablaj pri tiu lingvo.

Montriĝis, ke en apuda restoracio la japana sinjorino hazarde kontaktiĝis kun pola kongresano, kiu interalie rakontis, ke partoprenas homoj de multaj diversaj landoj. Aŭdante tion, ŝi tuj demandis pri iuj de Kopenhago, kun ili ŝi volontege parolus.

Tio estis la kaŭzo, ke oni alvokis min, kiu hazarde estis plej proksima. Nun mi staris antaŭ tute nekonata, eta japanino, kiu fervore kaj atente rigardis min kaj iom ekscite deman-

---

### \* El Japana Literaturo

A-5 266 p. ¥ 1,600

21 verkoj el moderna japana literaturo

### \* Nia Korpo (reviziita)

A-5 108 p. ¥ 650

Anatomio kaj fiziologio por laikoj

dis, ĉu mi konas ŝian fraton en Kopenhago. Unua reago ĉe mi estis granda surprizo pro la demando, kaj tuj sekvis la sento, ke estas tre naive atendi, ke mi konu ŝian fraton. Mi komencis afablan rideton por esprimi dubon kaj respondis, ke mi kredas, ke ne, sed subite kaptis min stranga sento, kaj mi daŭrigis dirante, ke se lia nomo estas sinjoro Takeuĉi, mi tamen konas lin.

Dum kelkaj monatoj antaŭ la vojaĝo mi havis japanlingvajn lecionojn ĉe instruisto kun tiu nomo, ne por lerni la japanan lingvon, sed nur por esti iom orientita pri ĝia strukturo.

Aŭdante tion ŝi tuj ŝpektis kvazaŭ trafita de elektra puŝo, granda emocio kaptis ŝin, kaj ŝi jetis sin en miajn brakojn, kvazaŭ mi estus la sopirata frato. Ŝi vere ploris pro ĝojo kaj kortuŝiĝo, ĉar ŝi estis apud homo, kiu konas ŝian fraton, kaj kiu el propra sperto povis rakonti, ke en Kopenhago li estas tre lerta instruisto kaj vere plaĉa kaj ĉarma homo. Li forestis de sia lando dum preskaŭ dek jaroj, kaj liaj tre maljunaj gepatroj kaj ankaŭ la fratino havis grandan sopiron pri li. Ĉe eŭropaj universitatoj li studis lingvojn kaj finfine venis al Kopenhago, kie li studas la danan kaj instruas la japanan.

La tuta epizodo daŭris nur kel-

kajn minutojn, sed la gvidantoj de la ekskurso malpacience atendis nin. Necesis tuj interrompi la interparolon kun la interkonsento, ke post unu monato, kiam mi revenos al Tokio, mi nepre kontaktigu kun ŝi. Emociplenaj ni adiaŭe ĉirkaŭbrakis unu la alian. Ĉeestantoj fotis, kaj mi kredas, ke ankaŭ ili sentis sin tuŝitaj, precipe s-ino Milewska el Pollando, kiu estis grava rolulo en tiu renkontiĝo.

Sidante en la aŭtobuso kaj pensante pri la okazaĵo mi tre scivolis pri la kaŭzo de ŝia vizito en Nara. Ŝi ja loĝas en Tokio, al kiu la distanco estas pli ol 500 km. En tiu rilato aperis interesa perspektivo, sed ĝin mi vidis nur unu monaton pli poste.

Intertempe mi travojaĝis la tutan nordan parton de la lando kaj faris prelegojn pri mia temo, la kosmologio de Martinus. Tiucele mi vizitis vicon da urboj, prelegis al centoj da homoj, havis sennombrajn interesajn interparolojn, vizitis perlojn de la japana kulturo, partoprenis ĉiutagan japanan vivon, mallonge dirite vivis en tute alia mondo ol mia propra,

**\* Volvotigo de Amikeco**

de prof. Ŝ. Hori

90 p. ¥ 750

Biologiaj eseoj  
kaj humanaj temoj

sed tamen ĉiutage sentis min hejme inter agrablaj kaj plaĉaj homoj. La prelegvojaĝon brile aranĝis la japana movado, Oomoto, kiu ankaŭ disponigis al mi elstaran kaj eminentan interpretiston, sinjoron Yoshimi Umeda, kune kun kiu mi vere ĝuis la tuton.

Kun peza programo kaj tiom da travivaĵoj unu monato rapide forpasas, kaj denove alvenante al Tokio, mi havis la senton, kvazaŭ nur hieraŭ mi forlasis tiun “plej grandan vilaĝon en la mondo”.

Umeda telefonis al fraŭlino Takeuĉi kaj ili interkonsentis, ke ŝi venu al la Oomoto-domo post la vespera prelego. Mi ne pensis, ke ĝi povus interesi ŝin, sed pro iu kaŭzo la aranĝo malfruiĝis, kaj sekve ŝi alvenis mallonge post la komenco de mia prelego, kies temo estis objektiva vivkoncepto. Kviete ŝi eniris kaj sidiĝis en la lasta vico kaj pacience aŭskultis la tuton.

Poste ni kune vizitis proksiman kafejon por pasigi 1–2 horojn en agrabla babilado. Daŭre fraŭlino Takeuĉi estis kortuŝita pro la renkonto kun konato de ŝia frato, kiun

ŝi ne vidis dum preskaŭ dek jaroj. Ni havis vere agrablan babiladon, mi demandis pri la kaŭzo de ŝia vizito en Nara. Granda estis mia surprizo, kiam mi aŭdis, ke la celo estis budhisma templo, kaj ke ne kiel turisto, sed kun serioza kaj profunda intereso ŝi venis tien. Tiu informo plilongigis nian kafejan restadon, ĉar ankaŭ por mi la temoj estas intereseaj. Ni povus daŭrigi dum horoj, sed tamen devis ĉesi. Plej multaj japanaj kafejoj havas fruan fermon kaj ĉi tiu nun je la 23-a horo. Kun multaj reciprokaj bondeziroj, kun miaj salutoj al ŝiaj gepatroj kaj kun ŝiaj al la frato en fora Kopenhago ni alvokis du taksiojn, kaj ĉiu en sia direkto ni hejmenveturis inter la homamasoj en la varma nigra nokto de Tokio.

Ĉe Ueno-parko mi haltigis la taksion por promeni la lastan parton de la vojo. Promenante sola en la kvieta preskaŭ senhoma parko mi meditis pri la nekredebla renkontiĝo en Nara kaj pri la frapa koincido de profundaj intereso. Ĉu ne estas nature konsideri tian okazaĵon subteno al la koncepto, ke la vivo ne estas hazardo, sed evoluas laŭ plano ankoraŭ parte kaŝita?

**\* Japanujo Hieraŭ kaj Hodiaŭ**

40 p. ¥ 120

Informoj bele kaj abunde  
ilustritaj

# La libera infano

Ĉu homo *edukas* siajn infanojn aŭ nur *bredas*? (Vidu la signifojn en Plena Vortaro.) Ni neniam vidis liberan homon, ĉar ĉiuj infanoj (inkluzive nin mem) estis influataj kaj muldataj de la gepatroj, instruistoj kaj socio. Nuntage, kiam la homkulturo dissolviĝas en la ĉiutagan nenion de tio kion ni nomas “nia vivo”, kiam la moroj transformiĝas, ni alvenis pensi, ke eduko estas simpla entrudigo de teknikaj konoj kaj encerbigo de amasoj da vortoj al infanoj grandnombre kunpremitaj en unu ĉambro.

Sed etaj esperlumoj aperis en Rishi Valley, Hindio kaj en Leiston (Suffolk), Anglio. Ankoraŭ restas veraj edukistoj, kiuj transpasas la limojn de la teorioj kaj vere agas havante kiel celon la liberigon de la homo.

Tamen, la menciitaj lernejoj ne rilatas inter si. En Rishi Valley oni edukas la infanojn laŭ la instruo de



J. Krishnamurti

(Foto el lia verko: “Sperto kaj Konduto”)

Jiddu Krishnamurti. En Summerhill, kiu estas lernejo fondita en Leiston (Anglio) de A. S. Neill, ĉefe surbaze de la penso de Sigmund Freud, oni permesas al la etaj gelernantoj tute memdecidi pri sia propra vivo. Ili mem decidas eĉ, ĉu partopreni aŭ ne la diversajn klasojn!

Distingi liberon disde laŭplaĉo estis ĉiam malfacile. Propra libero ne devas difekti la liberon de aliuloj. Sed multfoje mensmalsanuloj (Neill nomas ilin “kontraŭ-viv-uloj) suferas pro la feliĉo kaj libero de iu ajn, kiam fakte tiuj feliĉo kaj libero ne difektas rekte la iliajn.

---


\*) Fakulo pri infankuracado (pediatrio) en la Medicina Fakultato de Rosario, Argentino.

En kelkaj hejmoj infanoj havas ĉiujn rajtojn. En aliaj hejmoj infanoj havas neniun. En la ĝusta hejmo la plenkreskuloj kaj la infanoj havas samajn rajtojn, same kiel en la ĝusta lernejo. Neill verkis libron nomatan “Summerhill” aŭ “radikala alproksimiĝo al infaneduko”, en kiu li majstre klarigas pri sia lernejo preskaŭ 50-jara, kaj multfoje emfazas ke libero ne implicas trodroloton de la infano. Se trijara bubo deziras paŝi sur la manĝotablon, vi simple diros al li ne fari tion, kaj li, kompreneble, obeos same kiel vi mem devos obei lin, kiam li petos vin foriri el sia ĉambro, ĉar vi tutsimple ĝenas lin tie.

Neill diras interalie, ke li nur serĉas la veron pri la homaro, kaj ke per sia libro li oferas al ni raporton pri geinfanoj, kiuj kreskas en absoluta libero. Pastro iam demandis al Neill, kial oni ne instruas teorion religion en “Summerhill”. Neill respondis, ke pastroj ĝenerale predikas religion, sed en lia lernejo oni vivigas religion, komencante per la realigo de la vera amo al la geinfanoj.

Li asertas, ke ekzistas konkuro inter kredantoj je vivo kaj kredantoj de morto. Neŭtraluloj estas por la morto. Kredantoj je morto havos problemajn infanojn. Kredantoj je vivo havos sanajn infanojn.

Mi iam legis ŝercon kiu tekstis



A. S. Neill, kies verkaro el 9 volumoj en japana traduko nun eldoniĝas

jene : “Karulino, vidu kion la infano faras kaj diru al li ne fari tion”. Multfoje kaj ĉiutage observanto konstatos, ke gepatroj sintenas tiel (senkonscie) antaŭ siaj kompatindaj infanoj.

Ni devas permesi al la geknaboj esti tio, kio ili fakte estas ekde la komenco. Kono estas tre valora, sed feliĉo estas sendube ankoraŭ pli valora, ĉar ĝi apartenas al la saĝo.

Ni permesu al niaj infanoj esti, vere *esti* sinceraj. Ofte ni konsilas al ili pri sincereco, sed malbone reagas, kiam ili estas tiaj, kiaj ili spontane estas. Vivo per si mem prezentas multe



## Du junaj reprezentantoj de Oomoto revenis

Ni raportas, ke la du gejunuloj de Oomoto-Junulara Organizo, kiuj partoprenis la 52-an Universalan Kongreson, revenis hejmlanden en bona sano : s-ro Kunimaro Kakehi la 28-an de septembro, kaj f-ino Sumiko Gotoo la 5-an de oktobro. Ili kunvojaĝis tra Sovetunio kaj aliaj landoj ĝis la kongreslando, Nederlando. Ambaŭ plene ĝuis la atmosferon de la 52-a U.K. kaj organizis la sukcesan Kunvenon de Oomoto kun aliĝo de ĉ. 200 kongresanoj. Post la U.K. ili apartiĝis unu de l' alia por preni malsamajn vojojn : Kakehi veturis tra Danlando, Kanado kaj Usono, kaj Gotoo tra Svislando, Francujo, Anglujo, Italujo, Jugoslavujo, Ĉeĥoslovakujo, Skandinavaj landoj kaj revenis tra Siberie.

Farante al ni raporton pri sia vojaĝo, ili akcentis, ke en ĉiu loko,

da malfacilaĵoj, do ni ne aldonu pliajn malfacilaĵojn al niaj idoj.

Plenkreskuloj deziras entrudi siajn idealojn, siajn pensojn, siajn ideojn, esperojn, memorojn kaj eĉ timojn al la infanoj. Plenkreskuloj timas esti pasivaj antaŭ la infanoj.

Sed ja estas tio kion ili devas lerni kaj tio evidente estas pli mal-



s-ro Kakehi kaj f-ino Gotoo  
en Bjalistoko, Pollando

kiun ili vizitis, esperantistoj, individue aŭ kolektive, varme ilin akceptis, gastigis kaj helpis, kaj dank' al tio ili povis fari ĉie tre agrablan vojaĝon.

En ilia nomo kaj en la nomo de Oomoto-Junulara Organizo ni esprimas elkoran dankon al ĉiuj, kiuj afable helpis kaj bonvenigis ilin en siaj lokoj aŭ hejmoj.

*Oomoto-Centro*

facila ol "agi" (aŭ pli ofte misagi).

Ni permesu al niaj idoj esti simple *homoj*.


Ni devas fidi la homnaturon (kaj multe pli la infanan naturon).

Tiamaniere la infanoj retrovos la ĝustan vojon por la homaro, aŭ, en la lasta el la okazoj, tutcerte pli bonan vojon.

## AL LA LEGANTARO DE OOMOTO

Ekde unua de aprilo de jaro 1967 mi estas okupita en Ŝtata Juda Muzeo de Praha, kie mi deĵoras kiel faka gvidistino de eksterlandaj vizitantoj el plej diversaj landoj. Mi tie deĵoras samtempe en kvin lingvoj, germana, franca, ĉeĥa, rusa kaj Esperanto. La direktoro de la muzeo, kiu en sia junaĝo ankaŭ interesiĝis pri Esperanto, tre favoras la cirkonstancon, ke inter la aliaj lingvoj funkcias tie ankaŭ Esperanto. Jam tre ofte okazis, ke vizitis la Muzeon esperantistoj, kiuj ne posedis alian lingvon ol la internacian kaj mi povis proponi miajn servojn.

Hodiaŭ la Ŝtata Juda Muzeo fariĝis la plej vizitata muzeo en Praha kaj la homoj el la plej diversaj landoj venas tien por rigardi unikajn eksponaĵojn, kiujn vidi aliloke estas neeble en la tuta mondo. Estis mem la nazioj dum la dua mondmilito, kiuj kunveturigis ĉiujn ritualajn arĝentajn objektojn kaj broditajn templokurtenojn el ĉiuj likviditaj judaj komunumoj de Bohemio kaj Moravio en la Centran Judan Muzeon en Praha kaj, intencinte tie



La Malnova - Nova Sinagogo  
(ĉ.1270) en Praha

krei la Muzeon de elmasakrita juda raso, ne tuŝis, nek detruis la “gettojn”, enterigejojn kaj sinagogojn, malsame kiel en la aliaj landoj kaj urboj. Ĉiuj scias, ke en germana urbo Worms estis detruita la antikva sinagogo el 11-a jarcento, sed pro la intenco de nazioj ĝuste en Praha konserviĝis la antikva sinagogo el 13-a jarcento kiel ankaŭ la aliaj 5 sinagogoj kaj la enterigejo el 15-a ĝis 18-a jarcentoj netuŝitaj. Ĝi estas nun la unua en la centra Eŭropo, kiun venas admiri la tuta mondo. Permesu, ke mi citu en traduko la vortojn de la direktoro de Ŝtata Juda Muzeo, d-ro Vilém Benda :

\*

“La homoj venas trarigardi la Muzeon, kies analogion la tuta mondo ne posedas. Bonŝanca kaj samtempe malbonŝanca kohero da cirkonstancoj kreis komplekson da objektoj, en kiuj kaŝiĝas miljara viveca historio de juda loĝantaro en Bohemio kaj Moravio. Ĉiupaŝe alparolos vin la literaturo, scienco, belarto kaj precipe la fato de homoj, kiuj per sia ĉiutageco kaj samtempe eksterkutimeco enskribiĝis en la historion de la popolo, kiu akceptis ĝin kiel sian. La kulturhistoriaj memorindaĵoj, kiuj karakterizas la tipajn trajtojn de juda loĝantaro en ĉeĥaj landoj, estas por la kultura homo, ke li venu vidi el kiu ajn parto de la mondo; ne nur interesaĵo kaj unikaĵo de neesprimebla valoro, ne nur instruaĵo kaj alportajo en la puton de kleriĝo, sed precipe dokumento de alta progresemo, kultureco kaj tradicia, envere historia demokrateco de l' ĉeĥa popolo, en kies medio, nekonanta malamon, ĝi povis ekestadi kaj vivteniĝi ĝis la hodiaŭa tempo-epoko. Ne estas analogio en la aliaj muzeoj, ĉar neekzistas la analogio de la fato, kiun la judoj kiel la tuto travivis en la historio de la homaro. La Muzeo nenion supozigas, nenion kaŝas. Ĝi diras la ververon al ĉiuj kaj pri ĉio, kio same interesas ĉiujn homojn en la



Monumento de judoj martirigitaj en la koncentrejoj dum la naziokupado

tuta mondo : vivi en la paco kun ĉiuj en reciproka estimo kaj amikeco. Pri tio pensu dum la trarigardo de Ŝtata Juda Muzeo.

Vilém Benda

Direktoro de Ŝtata Juda Muzeo en Praha.”

\*

La vortoj de la direktoro de ŜJM estu samtempe invito al vizito de Praha, kie mi inter la multnombra vizitantaro vidis en la grupoj de Turistagentejo de Ĉedok ankaŭ multajn japanojn.

En lasta tempo sciigis min la gvidanto de Eksterlanda Fakto de

## AŬTUNA MODESTO

Mia dezir' ne troas, modestas :  
knabina hejm', interne vibra lum',  
en kiu tablono kampa floro vestas  
montranta Vivon inda vivi nun. . .  
Nur ni trioje mutus en atend' :  
vi mia kara, mi kaj la silent'. . .

La kapon klinus mi al via sino,  
ke ĝin karese tuŝu varta man'.  
Imagus mi : vi estas la patrino,  
mi dorlotata kiel la infan'. . .  
Dum min fingretoj lulus al ripoz',  
de mi jam pasus for la taga proz'.

---

Oomoto, ke en septembro vizitos Praha fraŭlino Sumiko Gotoo, reprezentantino de l' Esperantista Junularo de Oomoto kaj mi kiel reprezentantino de Oomoto-revuo en ĈSSR prizorgos ŝian enkondukon en nian Esperanto-medion, pere de nialandaj esperantistinoj kaj esperantistoj prezentos al ŝi nian ĉarman urbon same kiel mi mem gvidos ŝin tra nia Juda Muzeo kun ĝiaj vidindaĵoj. Mi aldonu, ke en tiu ĉi jaro la unuan fojon estis eble efektiviĝi la abonon de nia legantaro ĉe mi por la revuo

Oomoto, pri kiu estas eksterkutima intereso. Ankoraŭ nun post duonjaro anoncas sin ĉe mi novaj kaj novaj ĝiaj abonantoj. Videblas, ke la riĉenhava materialo de la revuo kaptas multajn legantojn same kiel ĝia 70-jara tradicio. Kaj mi ĝojas, ke mia longjara strebo pri ĝia abonigo ne restis vana.

En lasta tempo mi ligis pli regulajn kontaktojn kun japano Kei Kurisu, en nia lando kaj la ĉefurbo Praha tre konata esperantisto, interpretisto de ĉeĥa kaj slovaka litera-

Ĉiela blu' el okulparo ravus,  
min logus al si pompa nova Maj' ;  
rozetojn ĝi de viaj vangoj havus  
kaj junan dolĉon donus via gaj' . . .  
Dum tiel en intimo sidus ni,  
forĝesus jarojn, grizajn harojn mi.

Al rava efemero min mi cedus  
por perdi sobron pri muela zorg'.  
Pro dolĉa mistifiko eĉ mi kredus,  
ke mia ŝipo velas al la bord',  
ĉe kies rodo min atendas jam  
la amatino kun parvoka am'.

Horeton tian mia rev' petegas  
por senti riĉa min, ne almozul',  
por foje pensi, vin nun amo regas  
kaj ne kompatato kun fordorma brul' . . .  
Mi ŝatus tre forĝesi por moment',  
ke ĉenas vin al fremda vir' — la sent' . . .

---

turoj en Japanujo pere de Esperanto. Li tre ekĝojis eksciinte, ke mi fariĝis deĵorantino de Ŝtata Juda Muzeo kaj ke mi ekde nun povas servi ankaŭ kiel perantino de informoj por li mem, kiujn li de la muzeo bezonas. Por liaj artikoloj en Japanujo, kompreneble. Li sendis longan leteron kun multaj demandoj pri detaloj, kiujn mi pere de esperanta traduko de lia letero al la personaro ĉe la Muzeo glate klarigis kaj ekde tiu tempo Esperanto en la okuloj de la tuta personaro fariĝis grava doku-

mento de ĝia ĝenerala utileco.

Antaŭ tri monatoj aperis en Praha tuta serio da poŝtmarkoj kun judaisma temaro. Precipe en venonta jaro, kiam okazos la miljara jubileo de Getto, ĝi akiros sian valorigon.

Mi kredas, ke multaj el vi ankaŭ eksopiros viziti nian ĉefurbon kaj nian Ŝtatan Muzeon por propraokule konvinkiĝi pri ĝiaj dokumentoj, admirindaĵoj kaj pri utileco de Esperanto, kiu tie konas sian utilan laboron.

## AMBAPALI

Kiel trovi la vojojn, sur kiuj la postsignoj de homaj piedoj estas surŝutitaj de dezerta sablo? Kiel esplori la vojetojn sur kiuj eĉ la delikataj piedoj de gazeloj faras siajn stampojn? Kiel sinteni sur la vojstrio, kie la homaro senĉese iradis kaj revenadis? Ĉu estus eble sen dubo kaj bedaŭro atingi flamiĝintan pordegon? Ho, nekonata Lando de komplikaj vojoj! Gvidu min al via mistera centro, por ke mi rekonu mian malgrandan vojeton sur kiu mi tiomfoje iradis kaj faletis!

---

Lektiko de Ambapali, fama, kaj riĉa kurtizano, fluis malrapide tra mallargaj stratetoj de antikva urbo.

“Lokon por nobla sinjorino. Ambapali!” “Lokon por sinjorino...” vokis senĉese la portistoj. Homoj disŝovadis por fari liberan lokon. Ĉiuj bone konis tiun nomon. Ambapali... kurtizano kiu havis feliĉon gastigi iam Budhon en sia mango-arba bosko. El sub duonfermitaj okuloj en migdalformo, kies nigritaj okulharoj jetadis blujn ombrojn sur la vangoj, Ambapali vidis dolĉan, neforgeseblan vizaĝon de Tatagato. Forta ekpuŝo vekis ŝin el revoj; ŝia lektiko karambolis kun alia. Eksonis kolera voĉo:

— Hej, vi friponoj, atentu! Vi meritas grandan punon... kiaj mallertuloj! Ho, Ambapali, kia surprizo! Mi ĝojas ke mi vin vidas, kvankam mi devus esti ofendita... Ĉu tio estas vero ke sublima Budho-Tatagato preferis vian inviton ol la mian? —

— Vere tiel estis, — princo Liĉavi — fiere respondis Ambapali — mi invitis lin kun la disĉiploj al mia domo, ne fore de mango-arba bosko, kie li ripozis. Li akceptis tre agrable mian inviton, pro tio kiam poste via sendito faris la samon en via nomo, li rifuzis... —

— Ho, kiel tio povas esti! — elvokis la kolerigita princo — Vi, virino fama pro fikutimoj, vi ricevas la honoron, kiu estis rifuzita al princo de reĝa deveno! —

— Mi estis en tio senkulpa — modeste respondis Ambapali mallevante



okulojn. — Iluminato diris ke Bodhisatvo estas nubo pluva kiu rosas ĉiujn, indajn kaj ne-indajn, malbonajn kaj bonajn. Bodhisatvo estas por ĉiuj senescepte. —

— Tamen devas ekzisti iaj ŝtupoj. Ĉu Tatagato ne vidis diferencon inter mi kaj vi?! —

— Li diris ke lumo ankaŭ ne faras diferencojn. . . —

— Tio estas neebla en homaj interrilatoj, tio estas absurdo! —

— Li diris ke absurdo estas avido de povo kaj orgojlo. . . Kvankam Li ne menciis vin, kara princo, tamen ĉiuj ĉeestantoj, en granda konkordo pensis pri vi. . . la kulpo ilia estas granda, evidente. . . ĉar Tatagato malpermesis pensi malbone pri iu ajn. . . tamen vi konas homan malperfektecon. —

Ambapali havis dolĉan mienon kaj subtila rideto ornamis ŝiajn belajn lipojn.

— Ho, tio estas tro multe por mia pacienco! Budho povas esti sankta, sed ne tiam kiam li faras homojn arogantuloj — Vi mensogas, Li tion ne diris! Atentu. . . mi aŭdis liajn disĉiplojn. . . —

— Nu, kion ili diris? — indiferente demandis Ambapali amuziĝante kun perlo de sia kolĉeno.

— La disĉiploj predikis tiele: “Majstro ne havas sekretan instruon, Li diras ĉion malkaŝe. Ĉiu lia vorto estas oceano, kiu forĵetas perlojn al sablo de la bordoj. Kiu trovos unu el ili, estos feliĉa. . .” Kaj mi, Ambapali, trovis tiun perlon. Mi estas feliĉa! —

— Vere? Kaj kio estas tiu perlo — Ambapali kaŝe oscedis.

— Budho diris ke la Vero estas unu, sed ĝiaj respeguloj estas sen-nombraj. Ĉiu el ni estas la spegulo. Zorgu nur ke la spegulo estu pura, kaj en vi rezidos la Vero. Tio estas perlo, Ambapali, kiun nur povus kapti homo alte evoluinta. Mi ĝin kaŝis profunde en mia koro. Kaj ekde tiu tempo, ho Ambapali, mi vidas min en vera lumo. Ĉar en ĉiuj flankoj de la mondo, ĉu mi turnis min al zenito, ĉu al nadiro, ĉu al okcidento, ĉu al oriento — ĉie aŭreolita de ora lumo sidas sur la trono de pensoj (kiujn naskis profunda meditado) mi, princo Liĉavi, kiu akiris spiritan perlon kaj aldonis ĝin al sia heredita riĉaĵo fizika kaj mensa. —

Dirante tion, li ne ekperceptis ke Ambapali aŭdis lin kun tia angoro, kvazaŭ ŝi ekvidus ian demonon. Ŝi rapide adiaŭis la princon. “Teruraĵo, teruraĵo!” Ŝi flustris, metante manon sur la frunto, ŝultroj kaj brusto por

## Impresoj pri muzikverkoj

“Lunluma Sonato”  
de L. v. Beethoven

La sincera am-konfeso  
estas nura memkonsolo.  
Tajdas la leona koro  
pro l' perfida am-promeso.

“La Sesa Simfonio”  
de P. Ĉajkovski

Feliĉ' spontana.  
Memor' nur vana.  
Espero — trompo.  
Vivo — tombo.

“La Cignoj de Tuonela”  
de J. Sibelius

Cigna kanto eĥas sur la lago  
je la lasta vivofina-tago.  
Tremas la plor' sen gut' larma,  
brule dolora kaj triste ĉarma.

“Primavera Tajdo”  
de S. Raĥmaninov

Bruas la ondar' en ritmo,  
kaj la primavero sorĉas.  
Suno helas, amo dolĉas,  
kaj la viv' — ne plu enigmo.

---

forpeli malicajn aŝurojn.

Kaj la princo longe postsekvis ŝin per okuloj. “Vidu, kiel fieras Ambapali! — murmuris. — Kvankam ŝi estas bela, eĉ tre bela, tamen kio estos se forlasos ŝin riĉaj protektantoj?”

Lektiko de Ambapali post trapaŝo de la ponto, haltis ĉe piedoj de pratempa templo. Tie atendis ŝin riĉe ornamita ĉaro kun du ĉevaloj. Ambapali translokiĝis en ĉaron kiu rapide startis kaj iris en la proksiman boskon.

— Viŝaka — diris Ambapali al juna servistino kiu sidis apud ŝi — Ĉu vi bone memoras tiun vojeton, kie ni renkontis Budhon unuafoje? —

— Eĉ tre bone, sinjorino. Sub densaj bambuaj arbustoj kreskis tie multaj neĝe-blankaj floretoj. Vi diris tiam ke ĉie kie tuŝis teron la piedoj de Budho ekfloradis belaj kreskaĵoj. —

— Jes, vi havas bonan memoron, kaj ĝuste tio estas ĉi tie. —

“Vltava”  
de B. Smetana

Tremas or-akveroj  
en river' Vltava.  
Ŝprucas mil pensoj  
je ĉi bildo rava.

“Romeo kaj Julieta”  
de S. Prokofiev

La muziko bela kaj nuancoriĉa  
pli efikas ol la dram' originala.  
Reviviĝas la am-paro malfeliĉa  
en Prokofiev-a geni' senkompara.

Uverturo de “Tristan kaj Isolde”  
de R. Wagner

Alten soras l' am-motiv' profunda,  
kaj iom post iom suben sinkas.  
La flam-ardon de la am' korfunda  
jen finfine la final' estingas.

“Arabesko”  
de C. Debussy

Stil' lirika  
— ekzotika,  
ton' groteska  
— arabeska.

“La Unua Simfonio”  
de V. Kalinnikov

La natura bild' intima  
kun aparta rusa ĉarmo.  
La profunda sent' anima  
min kortuŝas ĝis eklarmo.

“La Naŭa Simfonio”  
de L. v. Beethoven

Estas ĝi la solena proklamo  
de la vera, tuthomara amo.  
Grandioza verko por estonto  
kaj por la sunplena Nova Mondo.  
(1963)

---

Ambapali forlasis la veturilon sur la vojeto kaj enprofundiĝis en bambuan densaĵon. Jam de malproksime ŝi vidis blankajn floretojn. Vando de dikaj bambuoj baris al ŝi vojon. Jen tie kuŝis Tatagato.

— Ho, Tatagato — ŝi preĝis levante supren okulojn — Vi, en kiu ni ĉiuj vivas, lumigu mian vojon, ĉar ĝi estas malluma kaj dezerta. —

Poste ŝi kliniĝis antaŭ zenito, nadiro, kaj antaŭ kvar flankoj de horizonto.

— Ho, Tatagato, vi, kiu dispelas demonojn kaj aŝurojn, kaj la plej terurajn — servistojn de memamo, montru al mi la vojon de Bono! —

Kun fermitaj okuloj kaj levitaj brakoj, ŝi restis senmove kaj atendis... Sed la ĉieloj estis dezertaj. Kun vizaĝo malhela pro malĝojo ŝi revenis al la veturilo.

— Viŝaka, vi certe eraris: tio ne estas la vojo de Budho. —

— Ho, kiel mi estas malfeliĉa! Verŝajne mi forgesis ke tie apud

vojeto kreskis granda daktila palmo kun nesto de sovaĝaj kolomboj inter branĉoj. —

— Vi havas malbonan memoron. En la mia stampis la bildo de granda mango-arbo. —

Ili veturis en kontraŭan direkton, sed ankaŭ sub mango-arbo ne pliheliĝis la vizaĝo de Ambapali.

— Ni ambaŭ eraras : nenie mi povus trovi vojeton de la Budho. Princo Liĉavi diris ke li ĉie vidas sin mem, kaj aldonis, ke tio estas privilegio de alte evoluinta homo. Do . . . kara Viŝaka, mi ankaŭ . . . staras sur alta ŝtupo de evoluo, ĉar . . . mi ne vidas ĉie princon Liĉavi, sed min mem ! Granda honoro ! Tamen . . . mi ne fidas al tiu fera Ambapali . . . Kaj kion vi opinias pri princo Liĉavi ?

— Mi ? — respondis Viŝaka — Kion mi povus diri pri tiu nobla sinjoro ? Li alte brilas sur la ĉielo, kaj mi estas nur eta formiko . . . —

— Do mi diros al vi mian opinion : princo Liĉavi estas homo kruda, maldelikata, orgojla, avida, kaj malinteligenta . . . —

— Ho ! — ektimiĝis Viŝaka — Kial li tamen estas tiel superbela ? —

— Ĉar li estas granda sinjoro. Mia modesta scio, kiun mi akiris dank' al mia profesio, permesis al mi ofte subrigardi kontraŭan vizaĝon de bela modelo. Kredu min, tio estas la vero. Kiu pli bone povus koni la virojn, se ne ni, kurtizanoj ? Do . . . nun sekvas tre malagrabra konkludo, mia kara Viŝaka : ĉar se mi vidas ĉie Ambapali, kaj li ĉie princon Liĉavi, do ni vidas nur nin mem, kaj ne estas kapablaj vidi “veran” Veron. —

— Mi estas tiel modesta estaĵo, ke mi ne povas kritiki nek vin, nek princon. Tamen mi aŭdis dum la festeno, per kiu vi regalas Budhon, ke Li laŭdis vin, sinjorino, nomante vin vere saĝa virino. —

— Mia saĝo estas amareca frukto, Viŝaka. Mi sentas min perdita . . . —

Kaj videbliĝis ke Ambapali estas nevenkebla : nenio povus ekskuisian tronon en la pensoj.

Venis la sendito : “Saluton al Ambapali, nobla kaj fidela amikino ! Mia sinjoro invitas vin en reĝlandon Danamati. Vi povus resti tie kiom longe vi volas kaj viaj donacoj superos la trezorejon de maharaĝo”.

Ambapali respondis :

— Diru al via sinjoro, ke Ambapali serĉas Landon de Eterna Feliĉo ; tiun kiu troviĝas tie, kie droniĝas la suno post la ĉiela migrado —

Venis dua, tria sendito, kaj la respondo estis la sama. Tiam malkvie-

tigis la koro de bona kaj fidela Viŝaka. Ŝi kun zorgo rigardis kiel malpleniĝadis kofroj en la doma provizejo.

Kaj venis kvara sendito : la printempo, kaj frapis al la koro de Ambapali, sed ĝi restis fermita. Tiam la printempo atakis ĝin per tempesto de koloroj. Kontraŭe al benketo, sur kiu sidis Ambapali en ĝardeno, leviĝis vertikale nigra roko rosita per ŝnuretoj de akvogutoj, (tial nomita “Vando de Arĝenta Ploro”) ornamita per florantaj lianoj. Sur la fono de malhela ŝtonego brilis purpuro, violo de la floroj. Renkonte al la koro de Ambapali eliris el malseka vando unu viola floro sur la verda ingo. Belega floro, plene disvolvita. Ambapali rigardis ĝin kiel sian amikon, eble ĝi havas ian mision? Evidente, ĝi portas inviton al mondo nekonata, mirinda.

Antaŭ ŝiaj ravitaj okuloj la floro komencis kreski, ĝis fine ĝi kovris tutan rokan vandon. Viola kaliko ŝanceliĝe moviĝis sur la verda tigo kaj brilis per viola fajro — Maja, eterna Iluzio ridetis al Ambapali kaj invitis ŝin al sia bela danco. Kion kaŝas Maja, eterna Iluzio? Ŝajne ke ĝi ion kaŝas, sajne ke tio estas “io” forĵetita de avida Ambapali sidanta sur la trono de pensoj.

El domo eliris Viŝaka.

— Sinjorino — ŝi diris kun zorgo — ni ne havas en nia provizejo eĉ plenmanon da faruno. Kion ni faru, sinjorino? —

— Rigardu, Viŝaka — emfazis Ambapali — sur la “Vando de Arĝenta Ploro” aperis mistera mondo, nova, nekonata! kaj terura Ambapali malaperis. . . Bona estas la vizaĝo de patrino Maja-Iluzio; vidu, ŝi ĉesis plori! Kaj anstataŭ min insulti, ŝi metis en miaj brakoj sian infanon — mondon kun viola kaliko. Ĉio kio pliŝarĝas la mondon, malaperis. . . . —

(Marto 1967.)



#### ZAMENHOF-MONUMENTO

Okaze de la II-a Seminario Esperantista en la urbo Santos Dumont, la pasintan julion, LION'S CLUB inaŭguris Z-monumenton, ĉe la ŝoseo Rio de Janeiro-Belo Horizonte.

# Abonkotizo de Oomoto

Laŭlanda tarifo por 1 jaro

Lando kaj kotizo :	pagu al :
<b>Argentino</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Mariano Calvo, El Rastreador, 679 Barrio Liniers, Buenos Aires 8a
<b>Aŭstralio</b> 1.60 aŭs. dol.	S-ro F.R. Banham, 31st Andrew's Avenue, Heidelberg W.22, Victoria
<b>Brazilo</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	Prof. Benedicto Silva, Cx. R. 17,96 Monte Aprazivel SP
<b>Britujo</b> 12 ŝil.	D-ro A. Mildwurf, 71 Compayne-Gardens, London N.W.6
<b>Bulgarujo</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Atanas Nikolov, Str. IV Asen, II 28, Sofia
<b>Ĉeĥoslovakio</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ino Cíhová Jana, Praha 9, u Svobodarny 12
<b>Danlando</b> 12 d.kr.	S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21. 13-Kopenhago BRH
<b>Finnlando</b> 6.00 f.mk.	S-ro Joel Vilkki, Somero
<b>Francujo</b> 8.40 F.	S-ino Renée Volpelière, Ul- 2018, 10 rue de la Servie, 30-Nimes (Gard) — Poŝtĉekkonto : Montpellier 1070-06
<b>Germanujo</b> 7 g.mk.	S-ro F. Moravec, 239, Flensburg-Murwik, Fördestr.15. Poŝtĉekkonto : Hamburg 683 19
<b>(DDR)</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld)	S-ro Albert Klemm, Schwarzburger Strasse 5, Bad Blankenburg(Thur, Wald)
<b>Grekujo</b> 48 dr.	S-ro K.Zahariadis, Parodos Gabriel, Vasiliadis 4, Kirokrini, Thessaloniki
<b>Hindujo</b> 7.2 rp.	S-ro R. B. Joshi, H. 2/299, Byron Bazar, RAIPUR (M.P.)
<b>Hungarujo</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	D-ro Balla Ignác, Nagy-Lajos, k. u. 203, Budapest 14
<b>Italujo</b> 1,080 liloj	Itala Esperanto-Federacio, a/c Maria Frus, Via Po No 7, Torino
<b>Israelo</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld)	S-ro Ben-Alter Jehiel, Ta Doar 379, Petah-Tikva
<b>Jugoslavio</b> 1,350 din.	S-ro Jedjini Martin, Djure Djakovica 11/I, Subotica
<b>Kanado</b> 1.70 dol.	Reprezentanto serĉata (Volontulo skribu la La Ekster- landa Fakto de Oomoto.)
<b>Meksiko</b> 22 pesoj	S-ro José Serrano L., Central de Talabarteros 72, Col. E. Carranza, Meksiko
<b>Nov-Zelando</b> 12 ŝil.	S-ro W. Hudson King, "Esperanto Domo", 27 Norfolk Street, Whangarei, Northland
<b>Pollando</b> egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Edmund Sidorowicz, Warszawa Swierczewskiego 82-a, m. 22,
<b>Portugalujo</b> 48 esk.	S-ro J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4, dto, Lisbõa
<b>Svedujo</b> 9.00 sv. kr.	S-ro A. H. Tähtinen, Timkatan 3, IV, Göteborg N
<b>Usono</b> 1.70 dol.	S-ino William H. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, Calif, 94010.

En landoj, kies nomo ne troviĝas en la supra listo, oni sendu abonkotizon (egalan al 6.00 n.gld.) al : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, aŭ rekte al : Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.